# Francilia federacio
# KomitatKunsido (KK) 13/01/25

## Partopreno

- Raymonde Coquisart, (RC) ĉeestas
- Pierre Gauthier, vic-kasisto (PG) ĉeestas
- Didier Janot (DJ) ĉeestas
- Aleks Kadar, prezidanto (AK) ĉeestas
- Aurélien Lestage (AL) sin ekskuzis, transdonis sian voĉon al LPI
- François Lo Jacomo (FLJ) ĉeestas
- Didier Loison, kasisto (DL) sin ekskuzis
- Laure Patas d'Illiers, sekretario (LPI) ĉeestas
- Sabrina Rusch (SR) malĉeestas
- Guillaume Vera-Navas (GVN) sin ekskuzis, donis sian voĉon al AK

## Ekde la antaŭa komitatkunsido

- La protokolo de la lasta komitatkunsido 06/12/24 estis aprobita kaj enretigita al https://esperanto.paris/komitat-kunsidoj
- 13/12/24 intervjuo de PG dum *Bienvenue à l'Est*, elsendaĵo en la reta radio *Arts Mada*. La videaĵo spekteblas https://www.youtube.com/watch?v=yhd1NGFFis8 la intervjuo okazas proksimume ĉe la fino.
- 14/12/24 okazis la ZamFesto, organizita de nia asocio kun la fervojistoj kaj la pariza grupo de SAT-Amikaro. La ne-esperantista fervojista dancistaro ne venis pro forpaso de ilia estrino. La resto de la programo kontentige okazis, interalie la vojaĝo de Lucien Péraire, surscenigita de Régis Fournier, kaj la spektaklo de la profesia esperanta muzikisto Armel Amiot, kiu kostis 700€ por la federacio.
- 11/01/25 babilrondo de gejunuloj, kontentiga

## Baldaŭaj eventoj

- AK sendos novjarajn bondezirojn al membroj, amikoj, esperantaj asocioj, gravulo en la urbodomo.
- Dimancon 19/01/25: KK de Espéranto-France. PG reprezentos nian asocion.
- Vendredon 24/01/25 7a-8a ptm: fulmkurso, laŭ artikolo en nia retejo https://esperanto.paris/esperanto-60-minutes DJ gvidos
- Sabaton 25/01/25 nova evento 2a-4a ptm: babilrondo gvidota de RC, poste je la 4a ptm kaj duono okazos la Reĝkuka kunmanĝo

## Kandidatoj al la komitato

La nunaj komitatanoj devas sciigi, ĉu ili rekandidatiĝas:

- RC NE
- PG JES
- DJ JES. Mia sinprezento plu ĝisdatas.
- AK JES
- AL JES
- FLJ JES
- DL NE
- LPI JES
- SR respondas nek al mesaĝo nek al telefona mesaĝo
- GVN NE

Aliaj homoj estis kontaktitaj por scii, ĉu ili pretas kandidatiĝi:

- Marianne Pierquin NE
- Emmanuel Debanne ne respondis
- Pascal Hébert JES
- Régis Fournier NE
- Guillaume Demeyere: kontaktinda

Laŭ nia statuto, la komitato devas enhavi inter 9 kaj 15 membrojn. Nun ni havas 7 kandidatojn. Eĉ se ni havus sufiĉe da kandidatoj, ni invitu pliajn homojn kandidatiĝi. Ne hezitu proprainiciate kontakti eblajn kandidatojn!

Ĉiu komitatano kiu rekandidatiĝas sendu koncizan sinprezenton al LPI. **La limdato estas 31/01/25**. Vi povas kopii/modifi vian lastan sinprezenton https://esperanto.paris/IMG/pdf/sinprezentoj-2024.pdf

Ankaŭ la novaj kandidatoj devos sendi sinprezenton al LPI.

# Ĝenerala Asembleo

## Ĉu eksterordinara?

Ĉiujare, konstateblas ke malfacilas trovi 9 kandidatojn. Eblus ŝanĝi la statuton (https://esperanto.paris/IMG/pdf/eo-paris-idf_statuts-2014.pdf) por malgrandigi la minimuman nombron de komitatanoj, ekzemple 6. Por tion fari, necesas eksterordinara ĜA (EĜA); la membroj voĉdonos por decidi ĉu fari la ŝanĝon.

*Article 10 – Modification des statuts*

*Les statuts peuvent être modifiés par un vote en assemblée générale extraordinaire. L'ordre du jour doit présenter les modifications proposées. La convocation précise les modalités de vote. Le vote par correspondance est autorisé. Pour être adoptées, les modifications doivent recueillir la majorité des trois cinquièmes des votants.*

Voĉdono de la komitato pri eksterordinara ĜA :

- Por:  5 voĉoj LPI AK GVN PG RC
- Kontraŭ: 2 voĉoj FLJ AL
- Sindetenoj 2 : DL DJ

--> La propono organizi EĜA estas akceptita.

## Dato, loko

La EĜA (eksterordinara ĝenerala asembleo) kaj la OĜA (ordinara ĝenerala asembleo) sinsekve okazos dimanĉon la 23an de marto 2025, de la 10a ĝis la 12a matene. Ili okazos surloke en la sidejo. Homoj kiuj ne kapablas veni al la sidejo povos konektiĝi per reta salono, prizorgota de FLJ.

## Voĉdono

La membroj voĉdonos antaŭ la ĜAj pri:

### EĜA

- ŝanĝo de statuto pri minimuma nombro de komitatanoj

### OĜA

- (mal)aprobi la raportojn agadan kaj financan
- elekti novan komitaton
- ĉu plia(j) voĉdono(j)? NE

## Balotado

La membroj kiuj havas retpoŝtadreson en la datumbazo Arthur de Espéranto France voĉdonos rete per balotilo.org. La reta baloto finiĝos la tagon antaŭ la ĜAj, tio estas la 22an de marto je 00h, t.e. la 21an vespere. La malmultaj (malpli ol 5) membroj kiuj ne havas retpoŝtadreson voĉdonos poŝte. Ili devos sendi la koverton tiel ke ĝi atingu la Ĉerizejon plej malfrue la 21an de marto, matene. La rezultoj estos kalkulataj la 22an de marto, kaj anoncitaj komence de la ĜAj.

### Tagordo

### EĜA

- publikigo de la rezultoj de la voĉdonado pri la ŝanĝo de statuto

### OĜA

- publikigo de la rezultoj de la voĉdonado pri la raportoj kaj komitatanoj
- prezento de la raportoj 2024
- prezento de la agadplano por 2025, peti ideojn kaj helpon por nunaj aŭ novaj projektoj

### Preparo de la dokumentoj

- Invitilo oficiala kun tagordo kaj praktikaj detaloj (ekz reta ligilo, programo de la tago): redaktota de LPI kaj AK
- Agadraporto 2024: redaktota de AK
- Agadplano 2025: redaktota de AK (ne sendota)
- Financa raporto 2024: preparota de DL kaj PG
- Balotilo, listo de kandidatoj kaj sinprezentoj: preparota de LPI

Atentu: ĉiuj dokumentoj estu pretaj kaj senditaj al LPI **antaŭ 10/02/25**. Tiam LPI resendos al la estraro kiu rete validigos ĉion antaŭ la sendo.

### Sendo de la dokumentoj

- La 2 raportoj kaj la sinprezentoj estos disponeblaj en la retejo esperanto.paris
- Al ĉiu membro kun retadreso, ni sendos mesaĝon kun: oficiala invito, ligilo al la 2 raportoj kaj sinprezentoj, informo ke la retejo balotilo.org sendos mem individuan ligilon por voĉdoni
- Al la membroj sen retadreso ni sendos poŝte: oficialan invitilon, la 2 raportojn, liston de kandidatoj kun sinprezentoj, paperan balotilon, 2 kovertojn por voĉdoni poŝte

LPI sendos ĉion plej malfrue la 23an de februaro, tio estas **unu monato antaŭ la Ĝa**j. Al la homoj, kiuj aliĝos dum tiu monato kaj havas retpoŝtadreson, LPI sendos la saman mesaĝon por ke ili povu partopreni la baloton kaj la ĜAjn.

### Programo de la tago

- 10h-12h: EĜA kaj OĜA
- 12h-12h30: aperitivo donacata de nia asocio, prizorgos DL (alportos trinkaĵojn) kaj FLJ
- 12h30-14h: surloka tagmanĝo per manĝaĵoj kaj trinkaĵoj alportitaj de ĉiuj ĉeestantoj
- 14h-17h: vizito aŭ promenado, AK kaj PG esploros la aferon, proponos ion, organizos: cinémathèque, arts et métiers (expo empreinte carbone visite guidée 15h https://www.arts-et-metiers.net/musee/empreinte-carbone-lexpo), grand palais immersif (https://grandpalais-immersif.fr/agenda/evenement/pixels-une-experience-interactive-avec-lunivers-creatif-de-lia)...

### Post la ĜAj

Necesos fari oficialajn protokolojn ("procès-verbal"), skribitajn en la franca kaj subskribitajn de la nuna prezidanto. Post la unua KK, kiam prezidanto kaj kasisto estos elektitaj, necesos fari "procès-verbal" de tiu KK, subskribitan de la ĵus elektita prezidanto. Necesos sendi la dokumentojn al la administracio (prefektejo) kaj al nia banko.

# Paĝmarkiloj

En 2021, ni presigis 1.000 ekzemplerojn da paĝmarkiloj. Modelo de 2021: https://drive.google.com/file/d/1cc6a-mczakWwvpvl5v9Kxfpf5CzxRoiw/view?usp=drive_link

Ekde tiam, la stoko iom elĉerpiĝis. AL studis plian presadon. Li proponas denove presigi 1.000 ekzemplerojn, fare de la sama presisto, laŭ la sama kvalito, por 154€78. Oni povas antaŭvidi ke tiu kvanto, kiu sufiĉis por la pasintaj 4 jaroj, sufiĉos por pliaj 4 jaroj.

Ĉu la komitato konsentas? JES, kondiĉe ke AL kontrolu ĉu la enhavo plu validas kaj faru ŝanĝojn se necese. Ekzemple: cxu muzaiko.info plu ekzistas? ikurso.fr? tubaro.aperu.net? fr.duolingo.com?. Kial ne aldoni: https://esperanto-tv.com/ ?

# Matematika foiro

La matematika foiro okazas ĉiujare en junio, ni kutime partoprenas, ĉar la budo senpagas kaj la rezulto ege kontentigas. FLJ

atentigas ke la afero urĝas, ĉar la limdato por aliĝi estas 17/01/25. Necesas trovi respondeculo(j)n, kiu(j) plenigos la aliĝilon, decidante pri detaloj (grando de la budo, ĉu inviti klasojn simile al lastjare) kaj varbos deĵorantojn. AL pretas partopreni same kiel lastjare. FLJ plenigos la formularon kaj organizos, sed ne ĉeestos tutan tempon.

# Venontaj kunsidoj

- EĜA + OĜA : dimanĉon 23/03/2025 de la 10a ĝis la12a matene
- KK, la novelektita komitato elektu la novan estraron: vendredon 28/03/25 je la 7a ptm kaj duono, mikse

# FINO DE LA KK